Si nosotros, campeones del Esperanto, por voluntad propia hemos dado al mundo entero el derecho pleno de mirar al Esperanto por el lado meramente práctico, y usarlo sólo para nuestra utilidad, esto, como se comprenderá, á nadie da derecho para exigir que todos veamos en el Esperanto solamente un negocio práctico. Desgraciadamente, en este último tiempo han sonado entre los esperantistas voces que dicen: «El Esperanto es solamente una lengua; evitad unir, aun en el terreno puramente privado, el Esperantismo con alguna idea, pues de otro modo se pensará que todos tenemos esta idea, y disgustaremos á diversas personas que no son partidarias de esta idea». ¡Oh, qué palabras! Por el temor de que disgustaremos, tal vez, á aquellas personas que quieren ellas mismas em-



de la afero de Esperanto, kiu estis la stelo, kiu ĉiam gvidadis ĉiujn batalantojn por Esperanto! Ho, ne, ne, neniam! kun energia protesto ni forĵetas tiun ĉi postulon. Se nin, la unuajn batalantojn por Esperanto, oni devigos, ke ni evitu en nia agado ĉion idean, ni indigne disŝiros kaj bruligos ĉion, kion ni skribis por Esperanto, ni neniigos kun doloro la laborojn kaj oferojn de nia tuta vivo, ni forĵetos malproksimen la verdan stelon, kiu sidas sur nia brusto kaj ni ekkrios kun abomeno: «Kun *tia* Esperanto, kiu devas servi ekskluzive nur al celoj de komerco kaj praktika utileco, ni volas havi nenion komunan!»

Venos iam la tempo, kiam Esperanto, fariĝinte posedaĵo de la tuta homaro perdos sian karakteron idean; tiam ĝi fariĝos jam nur lingvo, oni jam ne batalados por ĝi, oni nur tirados el ĝi profiton. Sed nun, kiam preskaŭ ĉiuj esperantistoj estas ankoraŭ ne profitantoj, sed nur batalantoj, ni ĉiuj konscias tre bone ke al laborado por Esperanto instigas nin ne la penso pri praktika utileco, sed nur la penso pri la sankta, granda kaj grava *ideo*, kiun lingvo internacia en si enhavas. Tiu ĉi ideo—vi ĉiuj sentas ĝin tre bone—estas *frateco kaj justeco inter ĉiuj popoloj*. Tiu ĉi ideo akompanadis esperantistmon de la unua momento de ĝia naskiĝo ĝis la unua tempo. Ĝi instigis la aŭtoron de Esperanto, kiam li estis ankoraŭ malgranda infano; kiam antaŭ dudek ok jaroj rondeto da junaj diversgentaj gimnazianoj festis la unuan signon de vivo de la estonta Esperanto, ili kantis kanton, en kiu post ĉiu strofo estis ripetataj la vortoj: «malamikeco de la nacioj falu, falu, jam estas tempo.» Nia himno kantas pri la «nova sento, kiu venis en la mondon», ĉiuj verkoj, vortoj kaj agoj de la iniciatoro kaj de la nunaj Esperantistoj ĉiam spiras tute klare tiun saman ideon.

plear el Esperanto para asuntos prácticos para sí, nosotros debemos todos arrancar de nuestro corazón esa parte del Esperantismo que es la más importante, la más santa; esa idea que ha sido el fin principal del Esperanto, que fué la estrella que ha guiado siempre á los propugnadores del Esperanto. ¡Oh, no, no, nunca! Con enérgica protesta yo desecho esta exigencia! Si á nosotros, primeros luchadores por el Esperanto, se nos obliga á que eyitemos en nuestra acción toda idea, nosotros, indignados, haremos jirones y quemaremos todo cuanto hemos escrito para el Esperanto, aniquilaremos con dolor los trabajos y sacrificios de toda nuestra vida, arrojaremos lejos la estrella verde fija sobre nuestro pecho, y exclamaremos con abominación: «Con ese Esperanto que debe servir exclusivamente á los fines del comercio y de la utilidad práctica, nosotros no queremos tener nada común.»

Vendrá tiempo, cuando el Esperanto' habiéndose hecho posesión de toda la humanidad, perderá su carácter ideal; entonces ya se hará una mera lengua, ya no se luchará por ella, ya se le sacará entonces provecho. Pero ahora que casi todos los esperantistas son no explotadores, sino luchadores, del todo estamos contestes en que al trabajo por el Esperanto nos instiga no el pensamiento de la utilidad práctica, sino solamente el pensamiento sobre la grande é importante idea que entraña la lengua internacional. Esta idea—todos la sentís muy bien—es *la fraternidad y justicia entre todos los pueblos*. Esta idea acompañó al Esperantismo desde el primer instante de su nacimiento hasta nuestros días. Ella instigó al autor del Esperanto cuando era todavía un tierno niño; cuando hace veintiocho años una reunión de jóvenes de diferentes clases del Gimnasio festejó la primera señal de vida del futuro Esperanto, ellos cantaron un himno, en el cual, después de cada estrofa, se repetían las palabras: «Caiga que ya es hora, caiga la enemistad de las naciones». Nuestro himno canta «el nuevo sentimiento que ha venido al mundo»; todas las obras,



Neniam ni kaŝis nian ideon, neniam povis esti eĉ la plej malgranda dubo pri ĝi, ĉar ĉio parolis pri ĝi, kaj sindone laboris. Kial do aliĝis al ni la personoj kiuj vidas en Esperanto «nur lingvon»? Kial ili ne timis ke la mondo kulpigos ilin pri granda krimo, nome pri la deziro helpi al iom-post-ioma unuiĝo de la homaro? Ĉu ili ne vidas, ke iliaj paroloj estas kontraŭaj al iliaj propraj sentoj kaj ke ili senkonscie revas pri tio sama, pri kio *ni* revas, kvankam pro neĝusta timo antaŭ sensencaj atakantoj ili penas tion ĉi nei?

Se mi la tutan pli bonan parton de mia vivo memvole pasigis en grandaj suferoj kaj oferoj kaj ne rezervis por mi eĉ ian rajton de aŭtoreco—ĉu mi faris tion ĉi pro ia praktika utileco? Se la unuaj esperantistoj pacience elmetadis sin ne sole al konstanta mokado, sed eĉ al grandaj oferoj, kaj ekzemple unu malriĉa instruistino longan tempon suferis malsaton, nur por ke ŝi povu ŝpari iom da mono por la propagando de Esperanto—ĉu ili ĉiuj faris tion ĉi pro ia praktika utileco? Se ofte personoj alforĝitaj al la lito de morto skribadis al mi, ke Esperanto estas la sola konsolo de ilia finiĝanta vivo, ĉu ili pensis tiam pri ia praktika utileco? Ho, ne, ne, ne! Ĉiuj memoris nur pri la interna *ideo* entenata en la esperantismo; ĉiuj ŝatis Esperanton ne tial, ke ĝi alproksimigas reciproke la *korpojn* de la homoj eĉ ne tial ke ĝi alproksimigas la *cerbojn* de la homoj, sed nur tial, ke ĝi alproksimigas iliajn korojn.

Vi memoras, kiel forte ni ĉiuj estis entuziasmitaj en Bulonjo ĉe P. Maro. Ĉiuj personoj, kiuj partoprenis en la tiea kongreso, konservis pri ĝi la plej agrablajn kaj plej entuziasman memoron por la tuta vivo, ĉiuj ĝin nomas «la neforgebla kongreso». Kio do tiel entuziasmigis la membrojn de la kongreso? Ĉu la amuzoj per si mem? Ne, ĉiu ja povas

palabras y actos del iniciador y de los actuales esperantistas, siempre respiran con toda claridad esta misma idea. Nunca hemos ocultado nuestra idea, nunca pudo haber ni la menor duda sobre ella, pues todo hablaba y desinteresadamente trabajaba por ella. ¿Por qué, pues, se han adherido á nosotros las personas que no ven en el Esperanto más que una mera lengua? ¿Por qué no han temido que el mundo les hiciera culpables de un gran crimen, es decir, del deseo de ayudar poco á poco á la unión de la humanidad? ¿No ven que sus palabras están en contradicción con sus propios sentimientos y que inconscientemente sueñan lo mismo que nosotros soñamos, aunque por un vago temor ante insulsos ataques se esfuerzan en negarlo?

Si voluntariamente pasé la mejor parte de mi vida con grandes sufrimientos y sacrificios, y no me reservé siquiera los derechos de autor, ¿lo hice acaso por alguna interesada utilidad? Si los primeros esperantistas se expusieron con paciencia, no sólo á la constante burla, sino también á grandes sacrificios, y como ejemplo, una pobre maestra sufrió necesidad largo tiempo sólo para poder ahorrar algo para la propaganda del Esperanto, ¿lo hicieron por alguna utilidad práctica? Si con frecuencia personas en el lecho de la muerte me escribieron que el Esperanto era el único consuelo de su espirante vida, ¿pensaban ellos entonces en alguna práctica utilidad? ¡Oh, no, no, no! Todos únicamente se acordaban de la idea interna contenida en el Esperantismo; todos amaron el Esperanto, no porque aproximaba recíprocamente los cuerpos de los hombres, ni aun porque aproximaba los cerebros, sino solamente porque aproxima sus corazones.

Vosotros recordáis con qué fuerza estábamos todos entusiasmados en Boulogne. Todas las personas que tomaron parte en aquel Congreso han conservado de él el más agradable y entusiasta recuerdo para toda su vida, todos le llaman «el inolvidable Congreso». ¿Qué fué, pues, lo que entusiasmó á los miembros del Congreso? ¿Las diversiones por sí



havi sur ĉiu paŝo multe pli grandajn amuzojn, aŭskulti teatraĵojn kaj kantojn multe pli bonajn kaj plenumatajn ne de nespertaj diletantoj, sed de plej perfektaj specialistoj! Ĉu nin entuziasmigis la granda talento de la parolantoj? Ne; ni tiajn ne havis en Bulonjo. Ĉu la fakto ke ni komprenis nin reciproke? Sed en ĉiu kongreso de samnacionoj ni ja komprenas nin ne malpli bone, kaj tamen nenio nin entuziasmigas. Ne, vi ĉiuj sentis tre bone, ke nin entuziasmigis ne la amuzoj per si mem, ne la reciproka sinkomprenado per si mem, ne la praktika utileco, kiun Esperanto montris, sed la interna *ideo* de la esperantismo, kiun ni ĉiuj sentis en nia koro. Ni sentis, ke komenciĝas la falado de la muroj inter la popoloj, ni sentis la spiriton de ĉiuhoma frateco. Ni konsciis tre bone, ke, ĝis la fina malapero de la muroj, estas ankoraŭ tre kaj tre malproksime; sed ni sentis, ke ni estas atestantoj de la unua forta ekbato kontraŭ tiuj muroj; ni sentis, ke antaŭ niaj okuloj flugas ia fantomo de pli bona estonteco, fantomo ankoraŭ tre nebula, kiu tamen de nun ĉiam pli kaj pli korpigiĝados kaj potenciĝados.

Jes, miaj karaj kunlaborantoj! Por la indiferenta mondo Esperanto povas esti nur afero de praktika utileco. Ĉiu, kiu uzas Esperanto aŭ laboras por ĝi, estas esperantisto, kaj ĉiu esperantisto havas plenan rajton vidi en Esperanto nur lingvon, simplan, malvarman internacian kompreniĝilon, similan al la mara signaro, kvankam pli perfektan. *Tiaj* esperantistoj kredeble ne venas al niaj kongresoj aŭ venos al ili nur por celoj esploraj, praktikaj aŭ por malvarma diskutado pri demandoj pure lingvaj, pure akademijaj, kaj ili ne partoprenos en nia ĝojo kaj entuziasmo kiu eble ŝajnos al ili naŭva kaj infana. Sed tiuj esperantistoj, kiuj apartenas al nia afero ne per sia kapo, sed per sia *koro*, tiuj ĉiam sentos kaj ŝatos en Esperanto antaŭ ĉio ĝian internan *ideon*; ili ne timos, ke la mondo moke nomos ilin utopiistojn kaj la naciaj ŝovinistoj eĉ atakos ilian idealon kvazaŭ krimon; ili estos fieraj pri tiu nomo de utopiistoj. Ĉiu nia nova kongreso fortiki-

mismas? No, cada cual puede tenerlas á cada paso mucho mayores, escuchar representaciones y cantos mucho mejores y desempeñados no por inexpertos aficionados, sino por consumados especialistas. ¿Nos entusiasmó el gran talento de los oradores? No, no los tuvimos en Boulogne. ¿Acaso el hecho de habernos entendido mutuamente? Mas en todo Congreso nacional realmente nos entendemos tan bien y sin embargo nada nos entusiasma. No, todos habéis experimentado muy bien que nada de esto nos entusiasmó, sino la idea interior del Esperantismo que todos sentíamos en nuestro corazón. Nosotros sentimos que comenzaban á caer los muros entre los pueblos, sentimos el espíritu de fraternidad de todos los hombres. Comprendimos muy bien que hasta la final desaparición de los muros hay todavía mucha distancia; pero sentimos que éramos testigos del primer golpe fuerte contra esos muros; sentimos volar ante nuestros ojos un fantasma de mejor porvenir, fantasma todavía muy nebuloso que sin embargo, desde ahora, va tomando siempre más y más cuerpo, más y más poder.

¡Sí, mis queridos colaboradores! Para el mundo indiferente, el Esperanto podrá ser un mero negocio de utilidad práctica. Todo el que emplea el Esperanto ó trabaja por él, es esperantista, y todo esperantista tiene pleno derecho á ver en el Esperanto sólo una lengua, un medio sencillo, frío, internacional, de comprensión, parecido al de los marinos, aunque más perfecto. Tales esperantistas es de creer que no vendrán á nuestros Congresos, ó sólo vendrán con fines explorativos, prácticos, ó por la fría discusión de cuestiones puramente lingüísticas, puramente académicas, y no tomarán parte en nuestra alegría y entusiasmo, que tal vez les parecerá sencillo é infantil. Mas aquellos esperantistas que pertenecen á nuestra causa no con su cabeza sino con su corazón, siempre sentirán y apreciarán en el Esperanto, ante todo, su idea interna; no temerán que el mundo por burla los llame utopistas, y los arrastradores nacionales hasta atacarán su ideal



gos en ili la amon al la interna ideo de la esperantismo, kaj iom post iom niaj ĉiujaraj kongresoj fariĝos konstanta festo de la homaro kaj de homa frateco.

como un crimen; ellos estarán orgullosos del nombre de utopistas. Cada nuevo Congreso nuestro fortalecerá en ellos el amor á la idea interna del Esperantismo, y poco á poco nuestros Congresos anuales se harán la fiesta constante de la humanidad y de la fraternidad humana.

## Sciigoj

*Esperanto en la reĝaj palacoj.*—Oni tre bone scias ke la Greka reĝo estas ankaŭ fervora amanto de nia kara lingvo kiun li lerte parolas; kaj estas pruvo ke li faras propagandon en sia familio la sciigo kiun ne legas en «The Daily Cronich» de la 26 de Novembro, t. e. ke la princo Olaf el Norvegujo lernas esperanton; same faras la princoj de la reĝa familio angla.

**Francujo.**—Internacia Konsulejo Esperanta estas kreata, kiel de publika utileco, ĉe la komerca, mara kaj industria arbo de St. Nazaire-sur-Loire (Francujo). Ĝi oficiale estis fondita je la tuta aprobo de la Administracio franca de l'urbestraro, de la Fremdaj Konsuloj, de la Komerca Estraro, de la Komercistoj, de l'industrioj kaj marveturaj societoj.

La Konsulo celadas kaj klopodas por:  
1.<sup>a</sup> Helpi ĉiujn gefremdulojn de ĉiuj lingvoj aŭ nacioj kiam ili venas ĉe St. Nazaire-sur-Loire (Francujo).

2.<sup>a</sup> Helpi ĉiujn komercistojn de la tuta mondo en iliaj komercaj aŭ privataj aferoj, estante perulo inter la diversaj francaj kaj fremdaj marveturaj kaj fervojaj societoj, kaj ankaŭ apud la maristaj makleristoj; k. a.

3.<sup>a</sup> Esti perulo inter la komercisto kaj la fremdaj konsuloj.

4.<sup>a</sup> Konigi inter ili la komercistoj, la kolektistoj, k. a.

5.<sup>a</sup> Sciigi aŭ dokumentigi pri ĉiuj ajn sciigoj, aferoj, k. a.

Oni devas sendi 0'50 en poŝtmarkoj pro la respondo.

*El Esperanto en los palacios reales.*—Se sabe muy bien que el rey de Grecia es también amante fervoroso de nuestra lengua que él habla con perfección; y es una prueba de que hace propaganda en su familia la noticia que leemos en «The Daily Chronich» del 26 de Noviembre, esto es, que el príncipe Olaf de Noruega aprende el Esperanto, lo mismo que los príncipes de la familia real inglesa.

**Francia.**—Un Consulado Internacional Esperantista, como de utilidad pública, se acaba de crear en la comercial, marítima, industrial ciudad de St. Nazaire-sur Loire (Francia). Está oficialmente establecido, con la plena aprobación de la Administración francesa, del Ayuntamiento, de los cónsules extranjeros, de las autoridades comerciales, del comercio, de la Industria y de las sociedades marítimas de transportes.

El Cónsul cuidará y trabajará por:

1.<sup>o</sup> Ayudar á todos los extranjeros de cualquier lengua ó nación que acudan á St. Nazaire-sur-Loire (Francia).

2.<sup>o</sup> Ayudar á todos los comerciantes de todo el mundo en sus negocios mercantiles ó privados, siendo mediador entre las diversas sociedades francesas y extranjeras de transportes marítimos y también con los representantes marinos y otros.

3.<sup>o</sup> Ser mediador entre los comerciantes y los cónsules extranjeros.

4.<sup>o</sup> Dar á conocer entre sí á los comerciantes, coleccionistas, etc.

5.<sup>o</sup> Expedir noticias ó documentos sobre cualesquiera asuntos, negocios, etc.

Se deben enviar 0'50 fr. en sellos para la respuesta.



**Hispanujo.** *Murcia.*—Laŭ letero kiun ni ricevis, S.<sup>ro</sup> Petro Martínez Orozco, esperantisto de tiu-ĉi urbo, foriris Alĝerion, sen alia rekomenda letero. Li prezentis sin al la tiea esperantista Grupo, kie estis kore akceptata de la fervora prezidanto, kaj per lia helpo nia sampatrujano trovis tuj tre bonan oficon. Ni raportas pri tio, tial ke ĝi pli kaj pli altigas la utilecon de Esperanto.

*Cartagena.*—Dank'al la daŭriga laborado de nia kara samideano S.<sup>ro</sup> Saralegui kiu publikigis bonajn artikolojn pri Esperanto en la tiea presaro, okazis la 17.<sup>an</sup> de la lasta monato kunveno, en kiu oni prenis gravajn decidojn por la fondo de Grupo esperantista. Oni havis pli ol sepdek aliĝojn; antaŭen, S.<sup>ro</sup> Saralegui!

*Elche* (Alicante).—En tiu-ĉi grava urbo faras grandan propagandon sinjoro Lorenzo Torres, Pastro, kiu malfermos baldaŭ esperantan kurson.

*Valencia.*—La nombro de la personoj kiuj lernas Esperanton pligandiĝas. Sinjoro Aya faros kurson post la kristnaskaj festoj al la militistaj oficiroj; nun li pensas profiti la venontajn festajn tagojn, por fari ekskurson al *Játiva* (malnova Setabis) kaj Alcira kiun ĉiukaŭpremas du branĉoj de la ribero Júcar. Tie post solenaj paroladoj, li starigos la bazojn de du novaj grupoj. Ĉiam antaŭen!

*Carcagente* (Valencia).—Estas malfermita kurso de Esperanto kiun faras sinjoro Domingo Talens, advokato. Nian plej koran gratulon.

*Castellón.*—Esperantista Konsulejo estas fondita en tiu-ĉi ĉefurbo, kaj sinjoro Viktorino Aparici estas la Konsulo. Adreso: *Pi y Margall, 7, Castellón (Hispanujo)*. Ĝi estas malfermata ĉiujn nefestajn tagojn de la 10.<sup>a</sup> matene ĝis la 1.<sup>a</sup> kaj de la 6.<sup>a</sup> ĝis la 8.<sup>a</sup> vespere. Estas ankaŭ tie ĉi malfermitaj du kursoj de Esperanto kiujn faras S.<sup>ro</sup> Seijas, prezidanto de la Grupo; unu en la «Casino Mercantil», alia en la «Instituto Popular» al kiu ĉeestas multe de fraŭlinoj.

*Benicarló* (Castellón).—La Direkta

**España.** *Murcia.*—Según carta recibida, D. Pedro Martínez Orozco, esperantista de esta ciudad, salió para Argel (Africa) sin otra recomendación. Presentóse al Grupo esperantista de allí, donde fué recibido cordialmente por el entusiasta presidente, y con ayuda de éste, nuestro compañero encontró en seguida una buena colocación. Referimos esto porque realza más y más la utilidad del Esperanto.

*Cartagena.*—Gracias á la continuada labor de nuestro querido compañero señor Saralegui, que ha publicado buenos artículos sobre Esperanto en la prensa local, tuvo lugar el 17 del pasado mes una reunión en la que se tomaron importantes acuerdos para la fundación de un Grupo esperantista. Se obtuvo más de 70 adhesiones. ¡Adelante, Sr. Saralegui!

*Elche* (Valencia).—En esta importante ciudad hace gran propaganda el sacerdote D. Lorenzo Torres, que abrirá pronto un curso de Esperanto.

*Valencia.*—El número de las personas que aprenden el Esperanto crece. El Sr. Aya abrirá un curso, después de las fiestas de Navidad, para los oficiales del ejército. Ahora piensa aprovechar las próximas fiestas para hacer una excursión á Játiva (la antigua Setabis) y á Alcira, á la que abrazan dos ramales del río Júcar. Allí, tras de solemnes discursos, establecerá las bases de dos nuevos grupos. ¡Siempre adelante!

*Carcagente* (Valencia).—Se ha abierto un curso de Esperanto que desempeña D. Domingo Taléns, abogado. Nuestra más cordial enhorabuena.

*Castellón.*—Se ha fundado el Consulado esperantista, y es cónsul el señor D. Victorino Aparici. Dirección: *Pi y Margall, 7, Castellón (España)*. Estará abierto todos los días no feriados desde las diez de la mañana hasta la una, y desde las seis hasta las ocho por la noche. También se han abierto dos clases de Esperanto que da el Sr. Seijas, presidente del Grupo; una en el «Casino Mercantil» y la otra en el «Instituto Popular», á la cual concurren muchas señoritas.

*Benicarló* (Castellón).—La Junta Di-



Komitato de la Grupo Esperantista estas laŭ jene:

Honoraj prezidantoj, S.<sup>ro</sup> Zamenhof kaj Ayza; efektiva prezidanto, S.<sup>ro</sup> Pedro Vidal Miralles; vicprezidanto, S.<sup>ro</sup> Manuel Febrer Samper; sekretario, S.<sup>ro</sup> Enrique Manzana Sorribes; bibliotekisto, S.<sup>ro</sup> Jerónimo Esteller David; voĉdonantoj, S.<sup>roj</sup> Juan Boyer Canals kaj Maria Sorlí Canals.

La semo disjetita de S.<sup>ro</sup> Ayza antaŭ unu monato certe kaj grandege fruktodonas. La promeso kiun li faris sendi el Valencio esperantan profesoron, pligrandigis la nombron de la aliĝantoj al nia afero. Tiu ĉi profesoro estas nia direktoro S.<sup>ro</sup> J. Loira, kiu aliformigita de nun je *apostolo*, aŭvorte, de nia kara Esperanto, pensas trakuri unu post alian la ĉefajn urbojn de nia provinco, haltante nur en ĉiu el ili la tempon necesan por fari kurson de Esperanto. Inter la diversaj nomoj kiujn li havas notitajn en sia poŝa paperujo estis la unua Benicarló.

La 23.<sup>a</sup> de Novembro eliris el Valencio nia direktoro por komenci sian laboron, kaj kiel tiun ĉi sciigon jam antaŭe konis niaj Benikarlanaj samideanoj, eliris dismultenombre en la stacidomon, tiel ke kiam alvenis la vagonaro, la gasta profesoro surprize kaj agrable vidis la trotuarojn preskaŭ plenigitajn. Li ĝoje mal-supreniris kaj entuziasmplena afable salutis ĉiujn. La tuta aro akompanis lin ĝis la hotelo kie li faris malgrandan paroladon, gratulante sin mem kaj dankante la aliajn pro la korega akcepto kiun li havis. La kursoj estas malfermita en la kolegio de Sankta Ludoviko, kaj la unuan tagon oni plenigis la tutan salonon je lernantoj kiuj tre bone povis aŭdi la grandan paroladon de S.<sup>ro</sup> J. Loira, kiel antaŭparolo de la klarigoj kiuj donas la posedon de nia kara lingvo al progresemaĵ Benikarlanoj. Ni tutkore gratulas ilin kaj deziras mil feliĉaĵojn kaj bonan farton al nia karega Direktoro.

*Burgos.*—La 6.<sup>an</sup> tagon de la pasinta monato okazis solena malfermo de Esperanta kurso en la Burgos'a Komerca Ĉambro. S.<sup>ro</sup> Emanuelo Esteban, prezidanto de la tiea Grupo faris grandan paroladon, en kiu raportis pri la

rectiva del Grupo esperantista es como sigue:

La semilla arrojada hace un mes por el Sr. Ayza ciertamente y en gran manera da su fruto. La promesa que él hizo de enviar desde Valencia un profesor de Esperanto aumentó el número de los adictos á nuestra causa. Este profesor es nuestro Director, Sr. J. Loira, que transformado desde hoy en *apóstol* literalmente de nuestro querido Esperanto, piensa recorrer una después de otra las principales ciudades de nuestra provincia, deteniéndose en cada una de ellas el tiempo necesario para dar una clase de Esperanto. Entre los diferentes nombres que tiene anotados en su cartera era el primero Benicarló.

El 23 de Noviembre salió de Valencia nuestro Director para dar principio á su trabajo, y como esta noticia sabíanla de antemano los *samideanos* de Benicarló, fueron saliendo en gran número á la estación de tal modo, que cuando llegó el tren, el huésped profesor vió con agradable sorpresa casi llenos los andenes. Alegremente bajó, y entusiasmado saludó con afabilidad á todos. Toda la comitiva le acompañó á la fonda, donde él hizo un discursito felicitándose y dando las gracias á los demás por el cordial recibimiento que había tenido. Las clases están abiertas en el colegio de San Luis, y el primer día se llenó el salón de discípulos que pudieron muy bien oír el gran discurso del Sr. J. Loira, como prólogo de las explicaciones que darán la posesión de nuestra querida lengua á los hijos de Benicarló. Nosotros de todo corazón les felicitamos y deseamos mil dichas y buena salud á nuestro queridísimo Director.

*Burgos.*—El día 6 del mes pasado tuvo lugar la solemne apertura de la clase de Esperanto en la Cámara de Comercio de Burgos. D. Manuel Esteban, presidente del Grupo, hizo un magnífico discurso en que relató sobre el



Kongreso al kiu li ĉeestis. La mirindaĵoj de lia rakonto entuziasmigis la aŭdantaron. Li fine bedaŭris ke siaj okupadoj ne permesas al li fari tiun ĉi kurson, sed li prezentis, kiel lertan esperantiston sinjoron Ludoviko Corral, kiu prenis sur sin la taskon de profesoro.

En Normala Lernejo de Instruistinoj de tiu ĉi urbo, sammaniere ol en la Komercia ĉambro oni starigis kurson de Esperanto, kun la antaŭa permeso de la Universitata Rektoro de Valladolid. La graveco de tiu ĉi fakto estas grandega pro la efiko, kiun havos en la progresado de nia kara lingvo la helpo de tiuj ĉi oficialaj organismoj. La ĉeestantinoj estas ĉirkaŭ kvindek al du kursoj unu por la profesorinoj, alia por la lernantinoj. Profesoro estas nia kara amiko S.<sup>ro</sup> Manuel Esteban.

Esperanta Konsulejo de Burgos restas malfermita ĉe S.<sup>ro</sup> Teófilo Martínez, plaza Mayor, 45. Ĝi nur estos devigata respondi la leterojn kiuj enhavos postmarkojn neuzitajn de kia ajn lando, kaj plenumi la antaŭpagitajn mendojn.

*Bilbao.*—Estas tre rimankinda la senlaca laborado de nia kara amiko sinjoro Prados Urquijo. Per solena de tiu ĉi S.<sup>ro</sup> parolado estis malfermita kurso de Esperanto al kiu ĉeestas la plej gravaj kaj kleraj personoj el la urbo. Profesoro estas Pastro Prudencio Pérez, skolapiulo.

Ankaŭ estas malfermita Konsulejo ĉe S.<sup>ro</sup> Prados Urquijo kiu estas la consulo. Adreso: Alameda de Mazarredo, num. 1, Bilbao Hispanujo.

*Santiago* (Coruña).—La 5.<sup>an</sup> de lasta Novembro, oni festis en tiu ĉi urbo la malfermon de kurso esperanta senpaga, kiun faras en la Normala Lernejo nia senlaca kunbatalanto S.<sup>ro</sup> Carro García. Antaŭ la malfermo estis jam enskribitaj 40 lernantoj. Ankaŭ oni sciigas nin pri la Konsulejo Esperanta kiu ĵus aperis en tiu ĉi urbo. Estas Konsulo S.<sup>ro</sup> Santiago Carro García, strato Cantón del Toral, 6. —Urbo, Santiago de Compostela—Hispanujo.

*La Guardia* (Jaen).—Estas fondata

de Ginebra, al cual asistió. Las maravillas de su narración entusiasmaron al auditorio. Sentía, en fin, que sus ocupaciones no le permitiesen desempeñar esta clase, pero les presentó como á un diestro esperantista al Sr. D. Luis Corral, quien aceptó el cargo de profesor.

En la Escuela Normal de Maestras de esta ciudad, del mismo modo que en la Cámara de Comercio, se ha establecido una clase de Esperanto con el anterior permiso del Rector de la Universidad de Valladolid. La importancia de este hecho es grandísima, por la eficacia que ha de tener en el progreso de nuestra cara lengua el apoyo de estos organismos oficiales. Los concurrentes son cerca de cincuenta entre las dos clases: una para las profesoras y otra para las alumnas. El profesor es nuestro querido amigo don Manuel Esteban.

El Consulado Esperantista de Búrgos ha sido establecido en casa de D. Teófilo Martínez, plaza Mayor 45. Sólo se obliga á responder las cartas que contengan un sello de cualquier país y á verificar los encargos pagados con anticipación.

*Bilbao.*—Es notable el incansable trabajo de nuestro querido amigo señor Prados Urquijo. Con un solemne discurso de este señor se ha abierto la clase de Esperanto, á la que asisten las personas más importantes é instruidas de la ciudad. Es el profesor el P. Prudencio Pérez, escolapio.

También se ha abierto un Consulado en casa del Sr. Prados Urquijo, que es el cónsul. Dirección: Alameda de Mazarredo, núm. 1, Bilbao, España.

*Santiago* (Coruña).—El día 5 del pasado Noviembre se solemnizó en esta ciudad la apertura de la clase gratuita de Esperanto que desempeña en la Escuela Normal nuestro incansable coluador el Sr. Carro García. Antes de la apertura se habían ya matriculado 40 alumnos. También se nos comunica la aparición del Consulado Esperantista en esta ciudad. Es cónsul D. Santiago Carro García, calle Cantón del Toral, 6, Santiago de Compostela, España

*La Guardia* (Jaén).—Se funda la «So-



«Internacia Societo Pedagogia» por atingi la unuiĝon de ĉiuj geinstruistoj de la tuta mondo kaj helpi kiel eble plej la plibonegon moralan kaj materian de tiuj kiuj sindonas al ĉiuspeca instruado, kaj la progresadon de la pedagogiaj sciencoj. Ĝi eldonos gazeton, kiel oficiala organo, redaktotan esperante, kaj aranĝos kongresojn, ekspoziciojn, kursojn, paroladojn, ekskursojn, k. t. p. laŭ permesoj ĝiaj enspezoj. La regularo enhavas naŭ artikolojn. Jara kotizaĵo estas unu pezeto aŭ unu franko. La Centra Direkta Komitato estas laŭ jene:

Prezidanto, S.<sup>ro</sup> López Villanueva; vicprezidantino, S.<sup>ino</sup> Carmen de Burgos Seguí; sekretario, S.<sup>ro</sup> S. Baudín Agüero; vicesekretario, S.<sup>ro</sup> Cristóbal Muñoz Escobar; kasistino, F.<sup>ino</sup> Virginia Olóriz Sánchez; voĉdonantoj, S.<sup>roj</sup> Alfonso Barea kaj Guzmán Navarro.

Oni devas sendi la aliĝojn al la sekretario.

«Cidad Pedagógica Internacional» para obtener la unión de los maestros de todo el mundo, y para contribuir en lo posible al mejoramiento moral y material de aquellos que se dedican á cualquiera de los ramos de la enseñanza, y al progreso de las ciencias pedagógicas. Publicará una revista, como órgano oficial, redactada en Esperanto, organizará congresos, exposiciones, clases, discursos, excursiones, etc., según lo permitan sus fondos. El reglamento consta de nueve artículos. La cuota anual es una peseta ó un franco. La Junta Directiva Central es como sigue:

Se deben enviar las adhesiones al Secretario.

## Bibliografio

*Esperanto Leitraden*, eldonita de Esperanto Verlag Moller kaj Borel, Prinzstrasse, 95, Berlín.—Prezo, 0'20 markoj.

Bela tridekpaĝa broŝureto enhavanta la esperantan gramatikon kaj mallongan vortaron kaj kiu, eble, multe taŭgos por la disvastiĝo de la lingvo internacia ĉe la germanlingvaj landoj; ankaŭ ĝia malalta prezo faras el ĝi akireblan verkon, kiu donos klaran ideon pri la laboro facila de Esperanto.

Al ĝi ni deziras plej bonan sukceson.

*La vizitindaĵoj de belega Skotlando*, eldonita de Higgle kaj K.<sup>o</sup>, Rothesay, Skotlando.

Ni ricevis broŝureton eltiritan el la originala eldono, sed per la branĉoj oni divenas la trunkon, kaj nun la trunko estas sendube leginda kaj interesa priskribo de Skotlando ĝis la plej malgrandaj detaloj.

Ni varme deziras, ke niaj skotaj amikoj eldonu esperanten tradukitan la plenan originalan verkon.

*Manuel Complet de langue internationale Esperanto par les méthodes analytique et synthétique*, verkita de Eugene Mathys, fils, aĉetebla ĉe la aŭtoro en Louvain (Belgique).—Prezo en Belgando, 30 centimoj; en fremlando, 40 centimoj.

La plena lernolibro, france verkita de S.<sup>ro</sup> Mathys, videble montras, ke ĝia aŭtoro estas lertega esperantisto. Malgraŭ la multenombraj lernolibroj diverslingve publikigitaj, la apero de nova tiaspeca broŝuro ĉiam alportas ion novan; kaj tia multenombro estas necesa, ĉar kvankam la esperanta gramatiko ĉiam estas la sama, ŝanĝebla, la lernantoj estas tre malsamaj, kaj tiu lernolibro, kiu estas bonega por instruitaj homoj, tamen ne taŭgas por personoj malmulte instruitaj, alia, kontraste, kiu estas utiliga por instrui negramatikulojn, estas multpeza kaj eĉ enuiga por lingvanoj.

Ja ni povas diri, ke S.<sup>ro</sup> Mathys trafis la celon definitan por sia verko; en malmultaj



paĝoj, la esperanta gramatiko estas klare kaj logike malvolvata, sed sub formo nova kaj interesa permesanta liveri al la leganto plenan ideon pri la elpenso zamenhofa.

Ni jam de longe konas, kvazaŭ persone, S.<sup>102</sup> Mathys. Li estas varma disvastiganto de nia lingvo kaj korekta verkisto, kies klarigojn kaj opiniojn gramatikajn ĉiam ni atente kaj plezure legis. Tio, do, permesas al ni, senpartiaj kritikistoj, atenti lin pri eraroj, kiuj kredeble estis senkonscie elmontritaj: «Baldaŭ vi plej korekte eble parolos esperante». «Li kantas malplej laŭte eble» estas frazoj anstataŭindaj per: «Baldaŭ vi plej korekte *kiel* eble parolos esperante» kaj «Li kantas malplej laŭte *kiel* eble», ĉar la unuaj ne tradukas korekte la francajn esprimojn prezentitajn en la teksto. Tamen, ni rediras, tio ne malgrandigas la valoron de la verko, kiun ni avide legis.

*Esperanto Manuel.—Cours pratique et complet en 15 leçons.* Verkita de S.<sup>103</sup> Gabriel Chavet kaj Georges Warnier.

Jen alia bonega lernolibro por franclingvanoj, al kiu ni deziras plej bonan sukceson. Manko da loko kaj tempo malpermesas al ni ĝin preparoli tiel longe, kiel ĝi meritas.

La verko estas akirebla ĉe Librairie de l'Esperanto, 46, rue Sainte Anne, Paris.

*Curso práctico de Esperanto.—Lecciones graduadas y ejercicios para aprender rápidamente la lengua internacional,* por R. Duyos Sedó y V. Inglada Ors, con una carta-recomendación del Dr. Zamenhof.—Precio, 3 pesetas.

*Clave de los temas y ejercicios contenidos en el «Curso práctico»,* por los mismos autores.—Precio, 0'75 pesetas.

Al anunciar la publikación de esta obra, nos limitamos, por razones fáciles de comprender, á copiar los siguientes párrafos del prólogo con que los autores enca-bezan el «Curso práctico»:

«La divulgación rápida del Esperanto en todo el mundo civilizado, acelerada por el ruidoso triunfo del primer Congreso Esperantista de Boulogne-sur-Mer y el no menos brillante de Ginebra que acaba de celebrarse, tienden ya á patentizar la utilidad práctica de la lengua internacional en los usos comerciales y de interés particular. La conveniencia y aun necesidad de favorecer y encauzar esa tendencia, verdadera finalidad del Esperanto, exige facilidad y rapidez en la adquisición de las nociones más indispensables para hablarlo y escribirlo prontamente, es decir, posibilidad de estudiarlo como se estudian muchos idiomas extranjeros por personas que cifran sus aspiraciones en obtener la utilidad práctica que de ellos necesitan, prescindiendo de un conocimiento profundo que sólo debe tener interés para los que quieran escribirlos con la corrección y elegancia de un académico.»

«A este fin ha sido confeccionada la presente obra, que será también de utilidad para los profesores que expliquen cursos de Esperanto y para los discípulos que á ellos asistan, por su división en lecciones y por los ejercicios y temas que acompañan á cada regla.»

Esta obra, esmeradamente impresa por la casa Espasa de Barcelona, puede adquirirse en la Redacción de LA SUNO HISPANA.

R. DUYOS.

*Pri novat trigonometriaj sistemoj,* originale verkita de Prof. A. Dombrovski.—Prezo: 1'50 markoj, ĉe *Esperanto verlag Moller & Borel*, Berlin, S. 42 (Germanujo).

Nia afero plej vigle progresas: ne sufiĉas traduki esperanten literaturajn ĉiunaciajn verkojn, skribi originalajn esperantajn verkojn, fari priesperantajn teatraĵojn, mankis ankoraŭ ion elpensi en la scienca kampo kaj elmontri ĝin per Esperanto.



Tion ĉi al ni prezentas en la verko suprecitita nia eminenta samideano P. A. Dombrowski, aŭtoro de multaj ĉarmaj versaĵoj kaj de la famkonata teksto «*Pri unu speco de kurbaj linioj korcernantaj la V. Eŭklidan postulaton*», kiun tre ŝate akceptis ĉiuj Esperantistoj-matematikistoj.

La nova libro de nia rusa amiko estas sufiĉe grava por esti tre longe raportita, sed ĉar spaco mankas al ni en nia modesta gazeto, ni mallonge montros ĝian celon al niaj legantoj kaj la hispanaj amantoj de matematiko povos ĝin legi kaj ĝui de la komenco ĝis la fino, ĉar la verko estas nun hispanen tradukata kun permeso de la aŭtoro.

Kiel oni scias en la ordinara trigonometrio estas konsiderataj ses fundamentaj funkcioj: sin., tang., sek., kos., kotg., kosek., dependantaj de du grandaĵoj konstantaj, nome de la ronda radio  $\rho$  egala al unuo kaj de la angulo  $\varphi$  egala al  $\frac{\pi}{2}$  kiu montras la direkton de la sinusaj linioj.

Sed ĉu estas nepra la neŝanĝeco de valora grandeco, kiun oni alskribas al  $\rho$  kaj  $\varphi$  por ekzistado de trigonometria sistemo? Tute ne: oni facile komprenas, ke donante al  $\rho$  kaj  $\varphi$  iajn realajn valorojn (ekzemple:  $\rho = 2, 3, 4, \dots$  kaj  $\varphi = \frac{\pi}{3}, \frac{\pi}{4}, \frac{\pi}{5}, \dots$ )

oni ricevos novajn trigonometriajn sistemojn analogiajn, sed ne treidentajn al nia ordenara.

Sed tio ĉi ne estas ĉio: oni povas akcepti anstataŭ konstanteco de la du grandaĵoj  $\rho$  kaj  $\varphi$  ŝanĝeblecon de unu el ili aŭ ambaŭ, kaj samtempe konstantecon de unu aŭ du iaj ajn fundamentaj funkcioj sin., tag., sek., kos., kotg., kosek kaj tiamaniere oni ricevos novajn tute determineblajn trigonometriajn sistemojn.

Jen la ĉefaj ideoj de la matematika verko de S.<sup>ro</sup> Dombrowski en ĝi oni klare elmontras la diversajn okazojn pri konstanteco aŭ ŝanĝebleco de la diritaj grandaĵoj kaj oni ekzamenas la plej gravajn ecojn de la novaj trigonometriaj grupoj kaj sistemoj.

La elpenso de S.<sup>ro</sup> Dombrowski estas tre interesa kaj grava por matematiskoj kaj tial, ke la aŭtoro havis la inspiron skribi ĝin en Esperanto, ni modeste opinias, ke ĝia tradukado en ĉiujn plej gravajn lingvojn estus tre granda rimedo de propagando kaj altirus al nia afero multajn scienculojn, kiuj ĉiulande sin dediĉas al la studado kaj kultureco de la ĉarma, per ĝusteco loganta matematika scienco.

V. INGLADA.

## NOVAJ ANOJ DE H. S. P. P. E.

*Laguna* (Canarias): 596, Nicolás de L. Cáceres Castro.—*Puerto de la Cruz* (Canarias): 597, Sebastián Castro Díaz.—*Realejo Bajo* (Canarias): 598, Srta. Cecilia González Díaz.—*Los Silos* (Canarias): 599, Manuel M. Fernández del Castillo.—*Santa Cruz de Tenerife* (Canarias): 600, Cristóbal Sicilia; 601, Manuel Bonet García; 602, Alfredo Bonet García; 603, Alberto Camacho; 604, William Camacho; 605, Eusebio Benítez de Lugo; 606, Francisco Izquierdo de la Rosa; 607, Celso Núñez Pérez; 608, Germán Perera; 609, Emiliano Trujillo; 610, Ernani Zamorano Lomelino; 611, señora Eugenia González; 612, Luis Zamorano Benítez; 613, Alfonso Díaz Sansón; 614, Antonio Campos Reyes; 615, Abraham Rojas Rodríguez; 616, Ildefonso Maffiotte; 617, Francisco Pérez Codiño; 618, Emilio López Perea; 619, Francisco Marrero Marrero; 620, Juan J. Franchy; 621, Francisco Gómez Barreto; 622, Antonio Gómez Barreto; 623, Julio Gómez Barreto; 624, Carlos Rizzo González.—*Tuy* (Pontevedra):



625, Francisco González Quiles; 626, José García Sánchez; 627, José Martínez Her-  
mida; 628, Salvador Catalá Moragues; 629, Arturo Mengual Gisbert; 630, Salva-  
do Catalá Suarep; 631, Telmo Chacón Pérez; 632, Estanislao Ferreira M. de Argenta.—  
*Medina del Campo* (Valladolid): 633, Federico García Díaz.

Tipografía Moderna, á cargo de Miguel Gimeno, Avellanas, 11—Valencia.

*S.<sup>ro</sup> René Desassis*, 87, rue de Richelieu, Parizo.—Deziregas korespondadi ĉu  
per poŝtkartoj ĉu per leteroj, kun esperantistoj aŭ pli bone esperantistinoj hispanaj.

*S.<sup>ro</sup> Kadlec Karel*, Háľkova ul. 4. Praha-Vinohrady, Austriche, Bohéme, deziras  
korespondi kun hispanaj geesperantistoj per ilustritaj poŝtkartoj.

*S.<sup>ro</sup> Warnier & C.<sup>o</sup>* 46 rue S.<sup>te</sup> Paris, ĵus fondis librejon titolitan «Librairie de  
l'Esperanto», kiu vendas esperantajn librojn novajn kaj malnovajn kaj ĵus eldonis  
«Esperanto Manuel», bonegan libron pri kiu ni parolas en nia Bibliografio.

Ili sendos plenajn katalogojn, senpage, al tiuj kiuj volos ilin ricevi kaj sendos per  
revenanta poŝto la mendojn kiujn oni faros al ili.

Ĉiuj gelnantoj kiuj deziras korespondi esperante kun aliaj gelnantoj hispanaj  
aŭ alilandaj sin turnu al *S.<sup>ro</sup> Manuel Esteban*, San Juan 48 y 50.—Burgos.

## GRAVA ALVOKO

Dum la 2.<sup>a</sup> Kongreso, en Genevo, okazis multaj kunvenoj por divers-fakaj spe-  
cialistoj: legistoj, matematikistoj, katolikoj, anarĥiistoj, framasonoj, ŝakludistoj, k. c.,  
k. c.; kaj oni fondis eĉ *Scienca Sekcion*.

Tiu *Scienca Sekcio* enhavos, verŝajne, diversajn sub-sekciojn apartigotajn laŭ la  
diversaj fakoj: ĥemio, mekaniko, geologio, botaniko, k. c., k. c.

Inter tiuj ĵus cititaj, grava loko estos certe rezervata por astronomio.

Tial, ni kredas ke ni povas jam de nun utili la aferon, publikigante la jenan  
alvokon per kiu nia kara kunlaboranto, la klerulo F. de Roy, sin turnas

### AL ĈIUJ ESPERANTISTOJ ASTRONOMIISTOJ.

Estas fakto certa ke la progreso de Esperanto multe dependas de l' kreo de  
teknikaj vortaroj, kaj, dum la lasta tempo, tre grava penado estas farita en tiu ĉi  
direkto.

Dezirante, en mia speciala fako, kunlabori al la afero, mi provis formi vortaron  
de astronomio kaj parencaj sciencoj.

Evidente, tia laboro ne povas esti la verko de unu homo sola.

Por ke ĝi havu ian valoron, estas necesa ke multaj Esperantistoj el diversaj lan-  
doj kunhelpu al ĝi. Jam en 1903, mi skribis al multaj personoj kaj grupoj en la tuta  
Esperantistaro, petante ke la astronomiistoj respondu mian proponon. Malfeliĉe,  
krom DU esceptoj, Esperanto ne ŝajnis esti la lingvo de astronomio, kaj la verko  
senprogresis.

Mi nun ripetas kaj ampleksigas mian proponon, kaj forte petegas ke la Esperan-  
tistoj de ajn lando, kiujn la afero interesas, bonvolu skribi al mi. Mi do esperas ke,  
baldaŭ, ni povos verki kaj presigi bonan vortaron por tiu scienco, unu el la plej  
internaciaj.—FÉLIX DE ROY, 342, chaussée de Turnhout, *Borgerhout* (Anvers) *Bel-  
gique* (kunlaboranto de «La Belga Sonorilo», membro de astronomiaj societoj de  
Belgujo, Anglujo kaj Francujo).